# TEJO-aktuale: numero 241, 2010-04

### TEJO havas novajn Komitatanojn B!

En la oficperiodo 2010-2012, TEJO havos du Komitatanojn B: Michael Boris MANDIROLA el Italujo kaj Guy JOHNSTON el Britujo. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1055

### Traduki tejo.org

tejo.org estas plurlingva retpaĝo, sed iom post iom, ĝia enhavo ŝanĝiĝas, kaj nacilingvaj retpaĝoj malaktualiĝas. Ni do bezonas volontulojn kiuj pretas disponigi iomete da tempo por tradukado de ĝisdatigitaj retpaĝoj. Ne temas pri tradukado de ĉio, sed de gravaj paĝoj. Por iĝi tradukanto, vizitu tiun paĝon: http://tejo.org/eo/TradukiTejo.org

### TEJO membro havos propran membrokarton

Ekde 2010, la membroj de UEA 2010 kiu estas en TEJO aĝo (malpli ol 30) ricevos TEJO membro-karton. Tiu nova membrokarto ne anstataŭas la UEA membrokarton, ĝi simple havas la saman rolon. Tiukonsekvence, oni devas ankaŭ glui kvitancmarkon por ke ĝi estus valida. Ambaŭ membrokartoj de UEA kaj de TEJO validas por peti ekzemple rabaton por Kongreso. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1049

### Intervjuo kun Pafklik en la arkivejo de Varsovia Vento Elsendoj (VVE)

Intervjuo registrita decembre de 2008 dum Ago-Semajno, publikita en la 43a VVE, intervjuis Irek, tempo-daŭro 19:48. Aŭdu: http://www.facebook.com/l/18b01;www.podkasto.net/arkivejo/intervjuo-kun-platano-kaj-katakana-de-pafklik/

### [baveleto] IEK: Internacia Esperanto-Konferenco (17.07. - 24.07.2010) en la Harz-monataro

Estimataj, por tiuj, kiuj ne povos vojaĝi al UK en Kubo la internacia OSIEK-konferenco en la refreŝiga Harz-montaro estos bona alternativo. Jam multaj homoj el pluraj landoj aliĝis (NL, GR, CH, HU, DE, FR, BE)!

Ĉeftemo: Kial Esperanto estas revolucia lingvo?

ALIĜILO: Programkalendaro 2010 aŭ rekte per

Vi ŝparos, se vi aliĝos ĝis la 30-a de aprilo 2010: 100 eŭroj, 50% rabato por gejunuloj sub 26 jaroj, handikapuloj, 30% por samadresa kunulo de la aliĝinto. Pli da informoj sur la aliĝilo.

Bonvenon en somero!

Zsofia Korody, Peter Zilvar kaj lokaj organizantoj

### Subtitolojn de la filmo \"Paranormala Aktiveco\

Mi tradukis la subtitolojn de la filmo "Paranormala Aktiveco" kaj kreis ankaŭ la vikipedian artikolon. Konsiderante ke la subtitoloj povas esti interesaj por ĉiu esperantisto, mi volas disvastigi ilin plejeble multe.

La vikipedia artikolo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Paranormala_Aktiveco_(filmo)

Tie oni povas trovi la ligon por la subtitoloj.

Kvantumo, ordnascrazy ĉe gmail.com

### Gajnintoj de la konkurso 'Partoprenu IJK-n'

Aprilo 2010. TEJO kun ĝojo anoncas ke en 2010 tri homoj ricevos subtenon por vojaĝi al IJK en Kubo.

TEJO disponigis 1500 eŭrojn por la konkurso. Ĉi-foje la prijuĝo estis aparte malfacila pro la kvalito de la kandidatiĝoj kaj la nombro da partoprenantoj. La jenaj partoprenantoj ricevos partan repagon de siaj kotizoj al IJK en Kubo kaj/aŭ vojaĝkostoj:

- s-ino Luana Araújo de França el Brazilo. Ŝi neniam partoprenis en IJK ankoraŭ, sed estas vic-prezidanto de regiona asocio en Brazilo kaj jam kunorganizis regionan esperantan aranĝon.

- s-ino Tina Tišljar el Kroatio – Tina estas aktiva en la Kroata Esperanta Asocio, kaj kunorganizas kaj ĉeforganizas MIROn en Kroatio. Ŝi jam kelkfoje partoprenis en IJK kaj ĉiam ŝia helpo estis tre rimarkinda.

- s-ro Roger Gotardi el Brazilo. Roger aktivas en BEJO kaj regiona brazilo asocio, kaj aldone laboras por la revuo La Karavelo. Li neniam antaŭe partoprenis en IJK.

La kandidatoj estis prijuĝitaj laŭ aktiveco, motiveco kaj taŭgeco de ilia partopreno al la programo de IJK.
Ni gratulas ilin kaj ankaŭ salutas la malvenkintojn, ĉar multaj el ili ankaŭ meritis akiri la subvencion.

Ĝuu Kubon!

TEJO ĉiujare disdonas subvencion el la fonduso "Partoprenu IJK-n" por finance helpi al aktivuloj vojaĝi al kaj partopreni en IJK. Aperas alvoko al kandidatiĝo en la komenco de ĉiu jaro. Kandidatiĝu sekvajare! Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1061

### [tejo] Televido en Brno elsendis pri Esperanto

Hieraŭ la 30-an de marto 2010 matene post la dekunua horo kaj sekve denove vespere post la dudekunua horo tutlande en la kablotelevida reto kaj libere tra la interreto aperigis Brněnská televize ("Brna televido") en sia programo Vlna z Brna ("Ondo el Brno") 16-minutan intervjuon pri Esperanto, antaŭe registritan en la studio en Brno kun Marek Blahuš, vicprezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Junularo kaj prezidanto de ties loka klubo en Brno. La redaktoroj mem alparolis la Esperantistojn kaj interesiĝis specife ankaŭ pri agado de la loka Esperanto-klubo, kiu estas la plej malnova en la tuta iama aŭstri-hungaria monarĥio.

Ciferecan registraĵon de la elsendo oni disponigis por membroj kaj simpatiantoj de Ĉeĥa Esperanto-Junularo pere de la retejo dotSUB.com: http://dotsub.com/view/3d16cdf8-6930-4181-9a89-b2607f712d35

En la ludilo eblas elekti el kelkaj lingvaj versioj de subtekstoj (inkluzive de Esperanto) kiuj povas akompani la ĉeĥan sonon. Ĉiu registriĝinto krome rajtas aldoni tradukon en plia lingvo.

Dum antaŭaj jaroj aperis televide ankaŭ jenaj raportoj pri agado de ĈEJ:

* http://dotsub.com/view/136dd13c-4c8c-49dc-9bf5-ccd0410849dc (2008)

* http://www.youtube.com/watch?v=rwqJlTm5xrM (2009)

Marek Blahuš, Ĉeĥa Esperanto-Junularo, vicprezidanto, Ĉej ĉe blahus.cz

### [baveleto] Semajno de Esperanto en Straburgo, Inter la 19an kaj la 25an de aprilo 2010, Francio

Espéranto-Strasbourg prezentas la Semajnon de Esperanto en Strasbourg Inter la 19an kaj la 25an de aprilo 2010.
Tuta aro da eventoj en pluraj urbaj lokoj por okazigi novajn kulturajn eventojn, kiuj ebligos nekutimajn malkovrojn per Esperanto kaj samtempe diskonigon de la internacia lingvo. Kaj por lerni, la klubo proponos tutan tagon sabate la 8an de majo inter la 9a30 kaj la 17a por komencantoj.
Kontaktu nin (bflochon che esperanto.org aŭ mi) por pli da detaloj. La tuta programo aperas en la paĝaro de la klubo http://www.esperanto-strasbourg.net
Disvastigu la informojn al konatuloj kiu loĝas apud Strasburgo, kaj se vi hazarde trapasas la urbon, estu bonvena.
Amike, Cyrille Hurstel, Sekretario de Esperanto-Strasbourg, 00 33 950 57 68 00

### Venontaj renkontiĝoj

June (nur 100-jare), sune, kune - Itala Esperanto-Kongreso ek de la 21-a de aŭgusto 2010 apud Venecio http://italakongreso.esperantoitalia.it/;

Komuna Franca kaj 87a Germana Esperanto-Kongreso, 21a ĝis 24a majo (pentekosto), Kaiserslautern Germanio Pliaj informoj: http://esperanto-france.org/kaiserslautern2010 (france), http://esperanto.de/gea/anmeldung_dek.html (germane);

Beneluksa Kongreso, 13a ĝis 16a de Majo, Antverpeno, Belgio, Beneluksa Esperantokongreso kun Lingva Festivalo pri regionaj lingvoj (Frisa, Pikarda, Valona, ...) Ĉefa indeksa paĝo por la Kongreso de 2010: www.esperanto.be;

Blue floras la genciano 6 (Amuza junulara semajnfino) La Esperanto-junularoj de Baden-Virtembergo kaj Aŭstrujo invitas vin. 02.06 – 06.06.2010, Pliaj informoj kaj ALIĜILO: Inge Simon, Brünner Str. 20, D-73431 Aalen, Tel: 0049/7361/360615 (poŝtelefono: 0049/170/4739318), Retpoŝto:Inge.Simon ĉe esperanto.de; <br> HEJ invitas al IJS, de la 3-a ĝis la 9-a de aŭgusto, en la urbo Pécs http://www.ijs.hu/?q=eo/IJS-2010_;

8-a SOMERE, 23-a de julio - 6-a de augusto 2010 en Jünkerath/Eifel http://www.esperantoland.org/somere/;

9-a Novjara Renkontiĝo (NR), 27a de dec. 2010 - 3a de jan. 2011 supozeble en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nr/;

2-a Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj (ĉ. 14 - 30jaraj) 27-a de dec. 2010 - 3-a de jan. 2011 supozeble en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nis/;

Senpaga E-ferio en Danio - Roskilde-Festivalo!, 27.6. – 5.7.2010 http://roskilde.festoklubo.dk;

. la 21-a IJS en Pécs, Hungario, inter la 3-a kaj 9-a de aŭgusto http://tejo.org/eo/node/1044; <br> OSIEK-Konferenco (17.07.2010 - 23.07.2010) en Herzberg - la Esperanto-urbohttp://esperanto-urbo.de/page.php?pid=91295910a;

Anemona Renkontiĝo 2010, 14an ĝis la 16a de majo, Lesjöfors, Svedio http://seju.tejo.org/ar2010/;

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu

### TEJO havas novajn Komitatanojn B!

En la oficperiodo 2010-2012, TEJO havos du Komitatanojn B: Michael Boris MANDIROLA el Italujo kaj Guy JOHNSTON el Britujo. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1055

### Traduki tejo.org

tejo.org estas plurlingva retpaĝo, sed iom post iom, ĝia enhavo ŝanĝiĝas, kaj nacilingvaj retpaĝoj malaktualiĝas. Ni do bezonas volontulojn kiuj pretas disponigi iomete da tempo por tradukado de ĝisdatigitaj retpaĝoj. Ne temas pri tradukado de ĉio, sed de gravaj paĝoj. Por iĝi tradukanto, vizitu tiun paĝon: http://tejo.org/eo/TradukiTejo.org

### TEJO membro havos propran membrokarton

Ekde 2010, la membroj de UEA 2010 kiu estas en TEJO aĝo (malpli ol 30) ricevos TEJO membro-karton. Tiu nova membrokarto ne anstataŭas la UEA membrokarton, ĝi simple havas la saman rolon. Tiukonsekvence, oni devas ankaŭ glui kvitancmarkon por ke ĝi estus valida. Ambaŭ membrokartoj de UEA kaj de TEJO validas por peti ekzemple rabaton por Kongreso. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1049

### Intervjuo kun Pafklik en la arkivejo de Varsovia Vento Elsendoj (VVE)

Intervjuo registrita decembre de 2008 dum Ago-Semajno, publikita en la 43a VVE, intervjuis Irek, tempo-daŭro 19:48. Aŭdu: http://www.facebook.com/l/18b01;www.podkasto.net/arkivejo/intervjuo-kun-platano-kaj-katakana-de-pafklik/

### [baveleto] IEK: Internacia Esperanto-Konferenco (17.07. - 24.07.2010) en la Harz-monataro

Estimataj, por tiuj, kiuj ne povos vojaĝi al UK en Kubo la internacia OSIEK-konferenco en la refreŝiga Harz-montaro estos bona alternativo. Jam multaj homoj el pluraj landoj aliĝis (NL, GR, CH, HU, DE, FR, BE)!

Ĉeftemo: Kial Esperanto estas revolucia lingvo?

ALIĜILO: Programkalendaro 2010 aŭ rekte per

Vi ŝparos, se vi aliĝos ĝis la 30-a de aprilo 2010: 100 eŭroj, 50% rabato por gejunuloj sub 26 jaroj, handikapuloj, 30% por samadresa kunulo de la aliĝinto. Pli da informoj sur la aliĝilo.

Bonvenon en somero!

Zsofia Korody, Peter Zilvar kaj lokaj organizantoj

### Subtitolojn de la filmo \"Paranormala Aktiveco\

Mi tradukis la subtitolojn de la filmo "Paranormala Aktiveco" kaj kreis ankaŭ la vikipedian artikolon. Konsiderante ke la subtitoloj povas esti interesaj por ĉiu esperantisto, mi volas disvastigi ilin plejeble multe.

La vikipedia artikolo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Paranormala_Aktiveco_(filmo)

Tie oni povas trovi la ligon por la subtitoloj.

Kvantumo, ordnascrazy ĉe gmail.com

### Gajnintoj de la konkurso 'Partoprenu IJK-n'

Aprilo 2010. TEJO kun ĝojo anoncas ke en 2010 tri homoj ricevos subtenon por vojaĝi al IJK en Kubo.

TEJO disponigis 1500 eŭrojn por la konkurso. Ĉi-foje la prijuĝo estis aparte malfacila pro la kvalito de la kandidatiĝoj kaj la nombro da partoprenantoj. La jenaj partoprenantoj ricevos partan repagon de siaj kotizoj al IJK en Kubo kaj/aŭ vojaĝkostoj:

- s-ino Luana Araújo de França el Brazilo. Ŝi neniam partoprenis en IJK ankoraŭ, sed estas vic-prezidanto de regiona asocio en Brazilo kaj jam kunorganizis regionan esperantan aranĝon.

- s-ino Tina Tišljar el Kroatio – Tina estas aktiva en la Kroata Esperanta Asocio, kaj kunorganizas kaj ĉeforganizas MIROn en Kroatio. Ŝi jam kelkfoje partoprenis en IJK kaj ĉiam ŝia helpo estis tre rimarkinda.

- s-ro Roger Gotardi el Brazilo. Roger aktivas en BEJO kaj regiona brazilo asocio, kaj aldone laboras por la revuo La Karavelo. Li neniam antaŭe partoprenis en IJK.

La kandidatoj estis prijuĝitaj laŭ aktiveco, motiveco kaj taŭgeco de ilia partopreno al la programo de IJK.
Ni gratulas ilin kaj ankaŭ salutas la malvenkintojn, ĉar multaj el ili ankaŭ meritis akiri la subvencion.

Ĝuu Kubon!

TEJO ĉiujare disdonas subvencion el la fonduso "Partoprenu IJK-n" por finance helpi al aktivuloj vojaĝi al kaj partopreni en IJK. Aperas alvoko al kandidatiĝo en la komenco de ĉiu jaro. Kandidatiĝu sekvajare! Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1061

### [tejo] Televido en Brno elsendis pri Esperanto

Hieraŭ la 30-an de marto 2010 matene post la dekunua horo kaj sekve denove vespere post la dudekunua horo tutlande en la kablotelevida reto kaj libere tra la interreto aperigis Brněnská televize ("Brna televido") en sia programo Vlna z Brna ("Ondo el Brno") 16-minutan intervjuon pri Esperanto, antaŭe registritan en la studio en Brno kun Marek Blahuš, vicprezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Junularo kaj prezidanto de ties loka klubo en Brno. La redaktoroj mem alparolis la Esperantistojn kaj interesiĝis specife ankaŭ pri agado de la loka Esperanto-klubo, kiu estas la plej malnova en la tuta iama aŭstri-hungaria monarĥio.

Ciferecan registraĵon de la elsendo oni disponigis por membroj kaj simpatiantoj de Ĉeĥa Esperanto-Junularo pere de la retejo dotSUB.com: http://dotsub.com/view/3d16cdf8-6930-4181-9a89-b2607f712d35

En la ludilo eblas elekti el kelkaj lingvaj versioj de subtekstoj (inkluzive de Esperanto) kiuj povas akompani la ĉeĥan sonon. Ĉiu registriĝinto krome rajtas aldoni tradukon en plia lingvo.

Dum antaŭaj jaroj aperis televide ankaŭ jenaj raportoj pri agado de ĈEJ:

* http://dotsub.com/view/136dd13c-4c8c-49dc-9bf5-ccd0410849dc (2008)

* http://www.youtube.com/watch?v=rwqJITm5xrM (2009)

Marek Blahuš, Ĉeĥa Esperanto-Junularo, vicprezidanto, Ĉej ĉe blahus.cz

### [baveleto] Semajno de Esperanto en Straburgo, Inter la 19an kaj la 25an de aprilo 2010, Francio

Espéranto-Strasbourg prezentas la Semajnon de Esperanto en Strasbourg Inter la 19an kaj la 25an de aprilo 2010. Tuta aro da eventoj en pluraj urbaj lokoj por okazigi novajn kulturajn eventojn, kiuj ebligos nekutimajn malkovrojn per Esperanto kaj samtempe diskonigon de la internacia lingvo. Kaj por lerni, la klubo proponos tutan tagon sabate la 8an de majo inter la 9a30 kaj la 17a por komencantoj.
Kontaktu nin (bflochon che esperanto.org aŭ mi) por pli da detaloj. La tuta programo aperas en la paĝaro de la klubo http://www.esperanto-strasbourg.net
Disvastigu la informojn al konatuloj kiu loĝas apud Strasburgo, kaj se vi hazarde trapasas la urbon, estu bonvena.
Amike, Cyrille Hurstel, Sekretario de Esperanto-Strasbourg, 00 33 950 57 68 00

### Venontaj renkontiĝoj

June (nur 100-jare), sune, kune - Itala Esperanto-Kongreso ek de la 21-a de aŭgusto 2010 apud Venecio http://italakongreso.esperantoitalia.it/;

Komuna Franca kaj 87a Germana Esperanto-Kongreso, 21a ĝis 24a majo (pentekosto), Kaiserslautern Germanio Pliaj informoj: http://esperanto-france.org/kaiserslautern2010 (france), http://esperanto.de/gea/anmeldung_dek.html (germane);

Beneluksa Kongreso, 13a ĝis 16a de Majo, Antverpeno, Belgio, Beneluksa Esperantokongreso kun Lingva Festivalo pri regionaj lingvoj (Frisa, Pikarda, Valona, ...) Ĉefa indeksa paĝo por la Kongreso de 2010: www.esperanto.be;

Blue floras la genciano 6 (Amuza junulara semajnfino) La Esperanto-junularoj de Baden-Virtembergo kaj Aŭstrujo invitas vin. 02.06 – 06.06.2010, Pliaj informoj kaj ALIĜILO: Inge Simon, Brünner Str. 20, D-73431 Aalen, Tel: 0049/7361/360615 (poŝtelefono: 0049/170/4739318), Retpoŝto:Inge.Simon ĉe esperanto.de; <br> HEJ invitas al IJS, de la 3-a ĝis la 9-a de aŭgusto, en la urbo Pécs http://www.ijs.hu/?q=eo/IJS-2010_;

8-a SOMERE, 23-a de julio - 6-a de augusto 2010 en Jünkerath/Eifel http://www.esperantoland.org/somere/;

9-a Novjara Renkontiĝo (NR), 27a de dec. 2010 - 3a de jan. 2011 supozeble en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nr/;

2-a Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj (ĉ. 14 - 30jaraj) 27-a de dec. 2010 - 3-a de jan. 2011 supozeble en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nis/;

Senpaga E-ferio en Danio - Roskilde-Festivalo!, 27.6. – 5.7.2010 http://roskilde.festoklubo.dk;

. la 21-a IJS en Pécs, Hungario, inter la 3-a kaj 9-a de aŭgusto http://tejo.org/eo/node/1044; <br> OSIEK-Konferenco (17.07.2010 - 23.07.2010) en Herzberg - la Esperanto-urbohttp://esperanto-urbo.de/page.php?pid=91295910a;

Anemona Renkontiĝo 2010, 14an ĝis la 16a de majo, Lesjöfors, Svedio http://seju.tejo.org/ar2010/;

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu